# Scenejo

*Granda kuirejo, kies plafonon kaj flankajn murojn kaŝas drapiroj kaj sufitoj. La malantaŭa muro direktiĝas malrekte internen kaj supren laŭ la scenejo, de maldekstre; sur ĝi maldekstre du bretaroj kun vazoj kupraj, bronzaj, feraj kaj stanaj; la bretoj estas garnitaj per papero, krispita; iom dekstre tri kvaronoj de la granda arkaĵa elirejo kun du vitraj pordoj, tra kiuj oni vidas fontanon kun Amoreto, florantajn siringojn kaj elstarantajn piramidajn poplojn.*

*Maldekstre sur la scenejo la angulo kun granda kahela kameno kun parto de ĝia kapuĉo.*

*Dekstre elŝoviĝas unu fino de la manĝotablo, el blanka pinligno, de la servistaro kun kelkaj seĝoj.*

*La kameno estas ornamita per foliriĉaj betulbranĉoj; la planko estas surŝutita per juniperaĵo.*

*Sur la fino de la tablo granda japana spicoskatolo kun florantaj siringoj.*

*Glaciŝranketo, tablo por purigi porcelanon, lavostablo.*

*Granda antikviĝinta sonorigilo super la pordo kaj elbuŝiganta paroltubo sur la maldekstra flanko de la pordo.*